# EKO 2025

**Eo-tago horizonte**

EKO 2025-30. Julio 17. Pezo: Word 40, PDF 500 KB, Alkroĉaĵo Eo-Tago Sume ? KB

## La Esperanto-tago proksimiĝas




Jen ligilo por afiŝoj pri la Esperanto-tago 2025. https://esperantoporun.org/eo/esperanto-tago-2025/. Almenaŭ ĝis nun, ni diskonigas nur la afiŝojn. Sendu tradukojn, kaj mi faros alilingvajn versiojn.

Rafael Lima, unesperante@gmail.com

SMG akiris kaj sendis hungarlingvan tekston.

Alkroĉita estas komuniko de UEA pri la tago.
Mi ĵus aldonis la hungaran version.

## Herzberg senlace agas

Okazis prezentado de Esperanto en gimnazia projektsemajno. Responditaj estas demandoj: Kiel ekestis Esperanto? Kia lingvo ĝi estas? Kiel ĝi funkcias en la mondo? Kiel kaj kial oni lernu ĝin? Zsófia Kóródy kiel gastpreleganto povis prezenti la internacian lingvon kaj rakonti ankaŭ pri la multaj travivaĵoj per Esperanto al lernantoj de la 7-a kaj 8-a klasoj. En la sekva tago ili pretigis podkaston el la ricevitaj informoj kaj raportis pri la temo



## Ĉinio atingas mondan rekordon por maglev

La magnete levita prototipo atingis rapidecon de 650 km/hr ene de sep sekundoj. Tio fareblas, ĉar ĝi ne havas radojn. Nenio en la trajno tuŝas la relojn, per tio ĝi forigas la problemon de frikcio.

Fonto: Internacia Fervoja Revuo

## La renoma simpozio de ILEI

Jen la programo de la ILEI-Simpozio, kiu troviĝas en la retejo de ILEI.

https://www.ilei.info/konferenco/2025/Simposio%20de%20ILEI%202025.pdf

# Ĉinaj studentoj sukcese en Pollando

Estis bela fino de la magistraj studoj kun 10 ĉinaj studentoj antaŭ unu jaro. Nun ankoraŭ tri aliaj estas ĉi tie. Aperis ankau la Angla-Esperanta-Ĉina temvortareto pri 'Homa vivo kaj Loĝado' dank' al ĉinaj studentoj, Nuba kaj Suno



# Postsekvoj de la UK en Aruŝa



En Tanzanio okazis la Unua Landa Kongreso post la okazigo de la 109-a UK en Tanzanio.  La ideo naskiĝis de la landa kunveno okazinta en junio en Bunda.  La celo estas kunigi esperantistojn en Tanzanio kaj pli fortigi la movadon kaj  instruadon.

# Somera ondo por la mondo

Aperis la junia eldono de *La Ondo de Esperanto*, (324). Ni esperas, ke ĉi tiu 139-paĝa *Ondo* plaĉos al vi. Ĝi estas elŝutebla de:

https://esperanto-ondo.ru/Aktualaj/Ondoteko.php

La dosieroj ("pdf" kaj "ePub") estas elŝuteblaj per viaj "nomo" kaj "pasvorto". Se vi forgesis ilin, skribu al ni kaj ni resendos ilin al vi. La tria eldono (septembra/aŭtuna) de *La Ondo de Esperanto* por 2025 estos preta fine de septembro aŭ komence de oktobro.

Se dum la komenciĝinta Kongresa Sezono vi partoprenos interesan esperantistan kongresan renkontiĝon, sendu al ni prian artikolon (kaj fotojn).

Halina Gorecka (eldonanto) Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

## NASK jam naskiĝis

La 5-an de julio, NASK komenciĝis. La meznivelan kurson gvidis **Katalin Kovats** kaj tiuj pri verkado kun **Jorge Rafael Nogueras.**




## Artefarita intelekto en Koreio

Mi havas la plezuron prezenti al vi valoran prelegon de kara **prof. Bak Giwan, "Amondo"** pri la aktuala kaj grava temo: "Valoro de Esperanto en la AI-Epoko".
Vi povas spekti ĝin **ĉi tie:** https://youtu.be/Kc6THdZRijE

Artefarita Inteligento rapide ŝanĝas la edukadon tutmonde. Kiel esperantistaj instruistoj, ni devas kompreni kiel AI influas la lingvo-instruadon. kiajn ŝancojn kaj defiojn ĝi prezentas kaj kiel ni povas uzi AI-ilojn en nia laborego
Amondo, sperta en teknologio kaj edukado, prezentas ĉi tiujn temojn klare kaj kompreneble por ĉiuj. Post spektado, mi invitas vin dividi viajn pensojn:

- Kiel vi jam uzas AI en via instruado?
- Kiajn eblojn vi vidas por Esperanto-edukado?
- Kiajn zorgojn vi havas?

**Sendis: Ahmad Mamduhi.**

## Ŝtata vic-prezidanto salutis

Legu la salutmesaĝon de Juozas Olekas, unua vicprezidanto de la Litovia parlamento kaj Alta Protektanto de BET-59. https://sezonoj.ru/2025/07/bet-199/

## Aliĝoj al Brno bone progresas

Je la 1a de julio 2025 jam 1035 personoj el 62 landoj aliĝis al la 110-a Universala Kongreso, kiu okazos ekde la 26-a de julio en Brno. Laŭ la nombro da aliĝintoj la 110-a UK en Brno jam superis sep UK-ojn, okazintajn ĉi-jarcente.
Legu pli detale en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/07/brno-25/

# La Fondaĵo Canuto meritas vian subtenon!

## Ĉina-rusa kunlaboro

La urbo Kaiyuan(Kaj-jŭan) situas norde de la provinco Ljonino (Liaoning) en la nordorienta regiono de Ĉinio.  Ĝi havas 446 000 loĝantojn kaj estas adiministrata de la subprovinca urbo Tieling de la provinco Ljonino.

La Tajĝilukta sekcio de IKEF organizita sub prez. Stela JIAO Hui grupigas ok ĉinajn aliĝantojn al RET-2025 (Rusaj Esperanto-Tagoj) dum aŭgusto . Ili estas kuraĝaj, ĉar Rusio estas tre fremda al la ĉina esperantistaro, kvankam ni estas najbaraj landoj. Mi esperas ke la Tajĝilukta sekcio de IKEF povos doni al ni utilan sperton por venontaj kunlaboroj inter la rusa kaj ĉina Esperanto-organzioj.

Kunlaboro pri la turismo diskuteblas  kun la vicsekretario. de IKEF. s-ro Grando ZW<790862338@qq.com>

Ĉielismo WANG Tianyi.chielismo@qq.com ; http://ikef.info

## Baltio batalas brave

Al la ĵus okazinta BET-59 en Kaŭno. (Litovio) aliĝis 292 personoj el 32 landoj. Dum ĝi okazis 35 prelegoj, naŭ koncertoj, kvar spektakloj, kaj estis prezentitaj kvar filmoj. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/07/bet-201/

## La kunflua tajdo estas nun ĉe ni

Aperis jam ses numeroj de *Kunfluo*, la ĉiutaga gazeto de la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, redaktata de Paweł Fischer-Kotowski. Ĝin ricevas surpapere ĉiu BET-ano, sed ĝin povas elŝuti kaj legi ĉiu deziranto kiel bitgazeton laŭ la normo pdf.

Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2025/07/bet-200/.

========= vortoj: 1120 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj
ilei IKEF
Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**Dudek numeroj de 2025 aperis, kune kun la kvardek kvar numeroj de 2024**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.